



C/. Montseny, 5, 1-er
ES-08208 SABADELL

C. Cívica Montserrat Roig
C/. Sant Tomàs, 2
ES-08222 TERRASSA

"KAE-Infomilo"

(DL. Num. B. - 42645 - 92)

Nº 17 - Dua epoko. Dekunua aperjaro. Monatotria. Vintre de 1997

LA "ESPERANTO-BABILADOJ", ARANĜITAJ DE LA ORGANIZACIO "KULTURA ASOCIO ESPERANTISTA" = KAE, DAŬRE FUNKCIAS KUN RELIEFA BRILO

Efektive, tiuj popularaj Esperanto-Rendevuoj, per kiuj oni celas, krom interŝanĝi kulturajn opiniojn pri traktataj temoj, plej seriozan praktikadon de la lingvo, tiumaniere draste eliminante la tiel nomatan krokodiladon inter esperantistoj, periode daŭras kun kreskanta sukceso.

Tiuj Esperanto-konversacioj komenciĝis en la urbo Sabadell, en la hejmo de ilia iniciatinto, s-ano Luis Serrano Pérez, kaj poste ili intersekve okazis en la urboj Premià de Mar, Terrassa, Sant Cugat del Vallès, Barcelono kaj Sant Pau d'Ordal (*)

Por la jaro 1997 oni jam estas planintaj du pliajn "Esperanto-Babiladojn", kiuj havos lokon en la kultura societo "La Formiga Martinenca", en la regurbo Barcelono, kaj en Reus (Taragono).

Estas rimarkiginde, ke malgraŭ la preskaŭ intima karaktero de tiuj kulturaj konversacioj, jam kelkafoje ĉeestis ilin iu eksterlanda esperantisto, kiu fakto liveris, al la gepartoprenantoj, kroman stimulon interparoli en Esperanto. Aliaŭrbaj geinteresatoj persone partumi tiujn kunvenojn, volu telefone informi sin tra la numero (93) 727 50 21.

(*) Oportunan foton - faritan de la KAE-Prezidanto J.M.Galofré - kun grupo da gesamideanoj tiumotive kunvenintaj en salono de la tiea Hispana Esperanto-Muzeo, afable publikigis la ĵurnalo "Diari de Sabadell, kiu aparte raportis, pri tiu E-aranĝo, en videbla loko de tiu ĉiutaga gazeto.

4° INTERNACIA, KULTURA KAJ TURISMA ESPERANTO-SEMAJNO

Ĝi okazis de la 5^a ĝis la 12^a de oktobro 1996, en Calella (Barcelono), sub la aŭspicioj de la Hispana Esperanto-Muzeo. La Semajnon oni inaŭguris dimanĉe matene, kun ĉeesto de la tiea urbestro, s-ro Joaquim Rey Llobet, kiu per bondezira parolado malfermis tiun Esperanto-eventon. Sekve ni ĉeestis la internacian meson en la paroĥejo Sankta Maria kaj Sankta Nikolao, kiu ceremonio estis kuncelebrata en pluraj lingvoj, inter ili en Esperanto, kiun lastan zorgis pastro Claramunt, naskiĝinta en Calella, sed nun deĵoranta en Meksikio.

La kulturaj aktivaĵoj konsistis el Cseh-metoda kurso de Esperanto, gvidata de profesorino Carla de Lorenzi, funkciado de libro-servo kaj pluraj paroladoj. S-ano Luis Serrano Pèrez disertis pri la temo "Ni estas ĉirkaŭataj de kadavroj"; profesorino Carla de Lorenzi rilate al Andreo Cseh; s-ano Giordano Moya pri Homarunuigo; s-ino J. Ŝidorak prelegis pri "Trarigardo al Polujo"; s-ano Milan Sudec gvidis la debaton "Kiel fartas Esperanto?", mem projekciante tre interesajn video-filmojn. La lasta kultura aktivaĵo, nome estis la vizito en la Muzeo de Calella, kiu enhavas pli ol ses mil ceramikaĵojn, tradiciajn metiilojn, teksajn maŝinojn el la pasinta deknaŭa jarcento, pinakotekon el pli ol du cent pentraĵoj de urbano de Calella, la artisto Lluís Gallart, kaj kompletan pasintjarcentan "Apotekon Barri".

Krome oni ekskursis, en duontaga vizito, al "Marineland", en Malgrat de Mar, en kiu instalaĵo oni povis vidi dresitajn papagojn kaj akrobatajn delfenojn. Tutataga ekskurso al Perpinjano, kaj duontaga ekskurso - vizito al la botanika ĝardeno "Mar i Murtra", de la urbo Blanes.

Inter la distraĵoj reliefiĝis la Havanaj Kanzonoj de la grupo "La Barretina", el la urbo Malgrat de Mar, kun trinkado de "bruligita rumo", kaj ankaŭ invitite de la loka urbestro de Calella, oni promenis sur turisma trajneto tra la stratoj tiuurbaj, kaj fine al la "Festo de la Biero", aranĝita laŭ Munkena tradicio. Ja tiu semajna Esperanto-evento havis grandan sukceson.

Ĝis la 5^a Esperanto-Semajno. Kien?

G.M.

DEMANDOJ AL LA MIMOISTOJ PRI LA UZO DE LA REFLEKSIVO

Bernard Golden

Ankoraŭ unu problemo rilate la labirintan frazon

En mia aktujo enhavanta korespondaĵojn rilatantajn al KAE-Informilo, mi trovis leteron de s-ro Santiago Torné, kiu citis parton de tre mallerte verkita frazo laŭ stila vidpunkto.

"(la hodiaŭa kongreso)... nun, post longa interrompo, kaŭzita per la malĝojiga milito kun ĝiaj grandegaj revolucioj... kiel la 26-a kongreso malfermas novan serion" (Katolika Mondo)

S-ro Torné petis klarigon pri la ĝusteco de "ĝiaj", ĉar iu esperantista amiko lia diris, ke tiu poseda adjektivo estas erara. Legantoj de KAE-Informilo, kiu partoprenis en konkurso por reverki la tutan labirintan frazon (n-ro 20, 1991, pĝ 8), traktis la koncernan punkton jene:

1. estigita (participo) de milito kun siaj revolucioj
2. interrompo (substantivo) pro milito kun siaj revolucioj
3. Interrompis (finitivo) milito kun siaj revolucioj
4. interrompo kaŭzita de milito kun ties revolucioj

Tri el la konkursantoj anstataŭis "ĝiaj" per la refleksiva adjektivo "siaj", dum la kvara faris tion per la poseda pronomo "ties".

Estas evidente, ke ĉiuj kvar konkursantoj komprenis, ke "milito" funkcias kiel subjekto, kaj pro tio ili uzis jen la refleksivan adjektivon jen la posedan pronomon "ties".

Ĉar ekzistas diferenco de opinioj pri la formoj de la poseda adjektivo "ĝiaj/siaj", estus interese ricevi oficialan opinion pri tiu punkto laŭ la logikismaj dogmoj de la Mimoisma Skolo.

Kial okazis arbitra ŝanĝo de poseda adjektivo ?

En la tajposkripto de mia artikolo "Kvizo pri dek Georgoj" (KAE-Informilo n-ro 13, vintro 1996, paĝ. 7) mi skribis:

"Plej bone konata en Esperanto laŭ sia pseŭdonimo, Valerio Ari, kiu naskiĝis en 1949, dum pluraj jaroj aktivas kiel literaturisto...

En la frazo presita en Informilo, la redakcio anstataŭigis "sia" per "lia": laŭ lia pseŭdonimo". Ne estas malfacile trovi la t.n. kaŝitan subjekton, kiu pravigas uzon de la refleksiva adjektivo, se oni iomete reordas la vortojn en la frazo en la sekva maniero:

Valerio Ari (kiu estas) plej bone konata laŭ SIA pseŭdonimo... aktivas...

Ĉu la redakcio agis tute arbitre kaj senrespondece, aŭ ĉu estas eble elfosi el la peze pedantaj mimoismaj principoj iun bizancisman klarigon por la uzo de "lia"?

Bernard Golden

Damjanich u. 1/C. 1.8.

HU-8200 Veszprém Hungario

KIAL OKAZIS ARBITRA SANGŬ DE POSEDA ADJEKTIVO

Al tiu demando formulita de Akademiano Golden en sia artikolo, kiu aperas en paĝo n° 3 de tiu ĉi informilo, mi, la subskribinta redaktisto de la periodaĵo "KAE-Informilo", ekskuze respondas la jenon: La redakcio konsentas, ke en tiu kazo ĝi agis arbitre, sed ja response kaj bonafide, same kiel ĉe similaj okazoj ĝi kutimas procedi. Cetere la redaktiston V.H.LI. daŭre gvidas, en ties lingva interpretado de tekstoj, ne iu determinita skolo, sed ja lia lingva sento ĉiam orientata de lia propra devizo: "Ni strebadi ne por vivanta erarhava Esperanto, sed por vivanta gramatike ĝusta Esperanto!". Kompreneble tiu lingva celo grandparte koincidas kun la laŭ-Fundamentaj principoj starigitaj de la Hispana esperantologo, s-ano Luiso Mimó Espinalt, la bedaŭrata fondinto de la tiel nomata "Analiza Skolo".

Sekve, kun plena respekto al tiurilata teorio de s-ano Golden, jen kiel mi pravigas la anstataŭigon de sia per lia, helpe de interkrampitaj frazoj plus komparo kun la respektiva aktivo: "Plej bone konata (de oni) en Esperanto laŭ (ne: sia, ĉar kun refleksivo tio signifus apartenon al la kaŝita subjekto konantoj, sed ja) lia pseŭdonimo, Valerio Ari, kiu naskiĝis en 1949, dum pluraj jaroj aktivas kiel literaturisto..."

Se ni transskribas la enhavon de tiu frazo en aktivan, ĝi liveras saman sencion, nome: "Valerio Ari, kiun oni plej bone konas laŭ (ne: sia, ĉar kun refleksivo tio rilatus al subjekto oni, sed ja) lia pseŭdonimo... aktivas..."

V.H. LI., redaktisto de la "KAE-Informilo"

=====

ABONU, REABONU AŬ ABONIGU LA "KAE-Informilo"n

Tiu ĉi laŭ-Fundamente redaktata periodaĵo, specife Esperantisma, kostas nur 800 pesetojn jare, kiun monsumon volu transpagi, laŭeble per poŝta ĝiro, al s-ano Santiago Torné Grau, C/. Roca, 22 -3° 1ª ES-08208 Sabadell (Barcelono)

+++++

NASKIĜO EN LA SINO DE ESPERANTISTA FAMILIO

La 22-an de oktobro pasintajara, naskiĝis la bebino Laia (Eŭlalia) Serrano Maldonado, filino de Luiso kaj Puri (= Pura), loĝantaj en la vilaĝo Castellar de Vallés, apuda al la urbo Sabadell, kie rezidas ŝiaj geavoj Luis Serrano Pèrez kaj Maria Ferigle Danti, ambaŭ aktivaj esperantistoj. Al la feliĉa paro, geavoj kaj cetera familio, nian plej koran gratulon.

+++++

"KAE-Informilo danke kvitancas jenajn mondonacojn de :

J. Mª Bernabeu, el Callosa de Segura, 1.600 pesetojn.

Vincento Caudet Armengol, el Francujo, 100 francajn frankojn.

LITERATURA PREMIO, DOTITA PER 2.000 DOLAROJ

La verkoj por la nova literatura premio "Francisco Máñez" devas enhavi literaturajn trajtojn, kreokapablajn, kiuj tuŝu de proksime la valorojn de la homa animo. La juĝantoj atentos la verkojn, kiuj rakontos spertojn aŭ iniciatojn en rilato al la "vivmedio".

La konkursaĵoj sekvu jenajn regulojn:

- La verkoj devas esti originalaj, ankoraŭ ne eldonitaj aŭ premiitaj, verkitaj en Esperanto, subskribitaj per pseŭdonimo aŭ moto. La verkojn akompanu tute fermita koverto, ene de kiu troviĝu la originala titolo de la respektiva verko kaj nomo, telefon- aŭ faks-numero, kaj se eble retadreso de ties aŭtoro. Sur la koverto oni skribu la pseŭdonimon aŭ moton de la verkinto.

- Ĉiu konkursanto devas sendi po tri ekzemplerojn de la verkoj, per kiu li/ŝi konkursas, tajpitajn en duoblaj interlinioj en DIN A 4, unuflanke, kun longo minimuma dekpaĝa, kaj maksimuma kvindekpaĝa.

- Oni sendu la konkursaĵojn al "Sociedad Cultural Ateneo La Alianza", Plaza Doctor Cajal, 11, ES-46380. CHESTE (Valencia), Hispanujo.

- Estos aljuĝata unu sola premio, kiu konsistos el 250.000 hispanaj pesetoj (ĉ.2.000 usonaj dolaroj).

- Limdato por akceptado de la konkursaĵoj: la 14-an de aprilo 1997.

La verkaĵoj estos juĝataj kaj pro iliaj literaturaj valoroj, kaj pro ilia enhavo. Tiucele estos nomumita Teknika Komitato, kiu konsistos el homoj kun agnoskata prestiĝo, kiu faros la unuan selektadon. Poste, inter la proponitaj verkoj, Juĝantaro senapelacie fine decidus.

La livero de la premio okazos, ene de la 7-a Internacia Esperanto-Kongreso, en Valencio (Hispanujo) de la 8-a ĝis la 13-a de julio 1997.

=====

NOVA DISKO EN ESPERANTO

Eldonita de Warner Muzik, ĝi enhavas 10 temojn en la Internacia Lingvo. La disko estas ambicia projekto de grupo da hispanaj muzikistoj. La geaŭdantoj povos malkovri, tra la tutaj vortoj en Esperanto, ekde ekstraktoj famaj el DVORAK aŭ BETHOVEN ĝis inklude de anonimaj gekantistoj en la stratoj de Havano aŭ Santiago de Kubo.

Aĉetebla en FNAG. L' Illa Diagonal (Barcelono)

+++++

PLIAJN MONDONACOJN RICEVIS DE :

Trini Garcia, el Sant Cugat del Vallès	200 pesetoj
Josep Ivern Mas, el Barcelono	200 "" "" "" ""
Joaquin Bielsa, el Zaragoza	200 "" "" "" ""

PRI LA ENHAVO DE NIA ORGANO OPINIAS BRAZILA PROFESORO

Koran dankon pro la de vi sendita KAE-Infomilo, kiu la 27-an de septembro 1996 alvenis al mi. Mi opinias, ke via bulteno estas legebla /enda/inda. Ege interesa la teksto de Bernard Golden pri la homtipoj en la Esperanta komunumo. Vere li pravas, kaj tio estas internacia fenomeno.

Alia leginda artikolo estas "LERNU PER ALIULAJ ERAROJ, KIES FONTON NI REZIGNAS CITI". Mi esperas, ke vi ĉiam ĝin publikigos.

Mi petas permeson kritiki ion, fare de s-ano Felix Garcia Blázquez, en la artikolo "Perfektigo kaj -Perfektigo-". En sia artikolo li citas kelkajn "nekongruaĵojn" en la Fundamento (p.8). Sed pri du alineoj mi opinias, ke li miskomprenis la gramatikon. En la ekzemplo n° 3 :

E: RESTI KUN LEONO ESTAS DANĜERE

G: La finaĵo de la adjektivo estas "a". Tiaokaze la frazo estas tute korekta, ĉar la subjekto de la frazo estas "resti kun leono...". "Danĝere" devas finiĝi per-E, ĉar estas adverbo. Precipe pro tio, ke adverbo ĉiam modifas verbon. La samon ni povas diri : "PAROLI ESPERANTON ESTAS MALFACILE", sed "ESPERANTO ESTAS MALFACILA".

En la ekzemplo n-° 5, denove s-ano Fèlix miskomprenas la gramatikon, kiam li esprimas, ke en la komparativo oni nur uzas OL. Li forgesas, ke tiun "OL" oni uzas kiam temas pri egaleca komparativo. Do:

"MI ESTAS TIEL FORTA KIEL VI" (*)

estas tute kongrua kun la gramatiko de Esperanto. Fine, pri aliaj ekzemploj li tute pravas kaj laŭdindas.

Mi esperas, ke per tiuj "kritikoj" mi tute ne ofendos nian samideanon, sed ke mi estos kontribuinta al lia bona kompreno. Koran dankon.

Prof. Adelson Andrade Alves Sobrinho (Fortaleza-Brazilo)

(*) Tiurilata komentario de la redaktisto V.H.LI. : Kiel prave asertas Akademiano Karlo Stop-Bowitz, la grado evidente estas pli parenca al kvanto ol al maniero. Do ankaŭ ĝusta alternativo estus:

"MI ESTAS TIOM FORTA KIOM VI"

KORESPONDA ESPERANTO-KURSO DULINGVE UZEBLA

Tiu ĉi 16-leciona Esperanto-Kurso, kies ekzercaron la gelernantoj povas laŭvole traduki en la Kastilian aŭ en la Katalunan lingvojn, kostas nur 4.000 pesetoj, en kiu prezo estas inkludite dudirekta vortareto Esperanto-nacialingva, kun baza gramatiko kaj selektitaj ekzemploj en la sama libreto, plus perioda ricevado tute senpaga de la bulteno "KAE-Informilo", enhavanta taŭgajn tekstojn por plej efikaj lernado kaj samatempa praktikado de la Zamenhofa Lingvo. Krome, ankaŭ per tiu prezo, nome 4.000 pesetoj, estas senkoste liverata sonbendo, per kiu la gekursanoj povas agrable familiarigi kun la imitinda Esperanto parolata de la prestiĝa profesoro internacia, s-ano Milan Sudec.

Ĉiuj mendoj, faritaj de geinteresatoj dezirantaj enskribi sin en tiun favoraprezan Esperanto-kurson, estos traktataj nur post ilia koncerna antaŭpago, kiun volu efektiviĝi, prefere per poŝta ĝiro, por tiel eviti pliajn kostojn, al: KAE-Kurso de Esperanto per Korespondado", C/. Font Nova, 32. Telefono de ĝia direktoro s-ro Luis Serrano: (93) 727 50 21. ES-08202 SABADELL (Barcelono)

LERNU PER ALIULAJ ERAROJ, KIES FONTON NI REZIGNAS CITI.

"Unuafoje virina plejmulto"

Ĉar adverbo ne povas rilati al substantivo, tiu jam tradicie miskonstruita esprimo devus fariĝi Esperanta arkaismo, tial ke por esti ĝusta oni devus intermiksi en ĝin la supozeble mankantan adjektivon "(mal) granda", nome plej granda multo, aŭ prefere uzi la jam plurajare uzatan neologismon "maĵorio", ekzemple: "Unuafoje virina maĵorio"

Geinteresatoj ĝisfunde koni la laŭ-Fundamentan uzadon de tiuj gramatikaj nuancoj, volu konsulti la verkon "Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto" kaj ĝian "Komplementa Volumo", kiu lingva traktato konsistas el du libroj, aparte aĉeteblaj ĉe la libroservo de la Hispana Esperanto-Federacio, Apartado 119; ES-47080 Valladolid (Hispanujo)

=====

Aktuala adreso de la Redaktisto de la "KAE-Informilo":

S-ano Vincento Hernández Llusera, C/. Antonio Cusido, 6 B, 2º, 2ª.
08208 Sabadell (Katalunujo)

ESPERANTO ESTAS TOLEREMA MOVADO

Esperanto ne nur signifas pacon. Ĝi ankaŭ estas vehiklo de interrilatoj por praktiki bonan kunvivadon kaj komprenemon. Jes, komprenemon. Eble la Esperanto-Movado faris erarojn, kiuj iliatempe estis bezonataj, sed por la nuna tempo ili perdis sian signifon. Ilia eventuala ripetado nepre donus malbonajn, tute ne deziratajn rezultojn. Tamen, ĉu estas konsilinde prisilenti erarajn poziciojn? Ja tiaj ekzistas en la aktuala momento. Se oni dezirus plej vaste fari necesan konkludon pri la ĝenerala linio de ĉiuj diversaj tendencoj kaj movadoj, oni nepre devus akcenti la teniĝon de la esperantistaro; ke Esperanto estas ankaŭ toleremo.

La esperantistaro estas granda familio, kiu bezonas amikojn kaj simpatiantojn. Malgraŭ tio, ke tiuj ne dezirus lerni la lingvon, ili komprenas, ke la aktuala babelo, precipe ekzistanta en Eŭropo, devas esti solvata. Tial ke la Eŭropaj parlamentanoj ne akceptas oficiale la anglan lingvon, ĉar ne neŭtrala, sed ne oficiale ĝin praktikas. Nur Esperanto povas esti neŭtrala. Kial la politikistoj ne akceptas Esperanton? Tial, ke ili jam lernis la anglan lingvon kaj ne volas lerni alian lingvon. Por kaŝi sian mallaboremon, ili volas nenion aŭdi pri Esperantismo. Ĉu nur pro mallaboremo? Ankaŭ pro netoleremo. Bedaŭrinde toleremo mankas en multaj etosoj.

Marcel Lloberas

ESPERANTISMO LAŬ P.I.V.:

Ĝi estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa (Zamenhof)

NOVAĴO, KIU DEVUS APERI PASINTANUMERE

En amika dimanĉa babilado kun samcelanoj niaj, oni opiniis, ke muziko, kiel tiu de rokenrolo, unuigas la popolojn pli ol Esperanto. Do, atentu:

La dua volumo de Vinilkosmo-kompil' jam aperis en KD (kompakta disko 39 NLG) kaj KS (kasedo 23 NLG). Bonega muzika volumo kun 18 diversaj, sed aktualaj temoj, bele kaj profesie ludataj. La disko aŭ kasedo enhavas foldfoliojn kun Esperantaj tekstoj, kaj diskografion de la interpretistoj. Aĉetebla rekte al EŬROKKA, ESPERANTO, Rok-Asocio. FR 31450 DONNEVILLE (Francujo)

UTILA KONTAKTO INTER ESPERANTISTOJ

La 27-an kaj 28-an de decembro 1996, s-ano Julio Tarín Cortés kaj lia edzino, el Valencio, vizitis la urbon Sabadell, kie ili vigle konversaciadis, precipe pri Esperantismo, kun la tieaj s-anoj S.Torné Grau, J. M^a Galofré Domingo kaj V. Hernández Llusera.

LITERATURA KONKURSO DE "GAZETO ANDALUZIA"

En junio de 1997 aperos la 50-a numero de la revuo de "Andaluzia Esperanto-Unuiĝo". La respondeculoj de A.E.U. kaj de "Gazeto Andaluzia", opiniante, ke tiu estas grava numero por revuo, kiu aperas nur 4 fojojn jare, simbolante do laboron de 12 1/2 jaroj, decidis organizi UNUFOJAN literaturan konkurson, kiun regos jena **REGULARO** :

1) Nur estas eble konkursi per noveleto (j) originale verkita (j) en Esperanto. NE per tradukoj el aliaj lingvoj.

2) Ĉiu konkursant(in)o rajtas preni parton en ĝin per tiom da konkursaĵoj, kiom li/ŝi volas.

3) Ĉiu konkursant(in)o devas sendi tri ekzemplerojn de la konkursaĵo, tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj, kun la indiko "Konkurso: 50 numeroj de "Gazeto Andaluzia". La konkursaĵo ampleksu maksimume 6 paĝojn, po 30 linioj.

4) La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por tiel kaŝi la identecon de la konkursant(in)o. En aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursant(in)o.

5) Kune kun la Verdikto, aperos la nomoj de la juĝintoj.

6/ La dat-limo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 31-a de marto de 1997.

La Verdikto estos publikigata en la 50-a numero de "Gazeto Andaluzia", en junio de 1997. Oni diskonigos la nomon de la gajnint (in) o tra aliaj gravaj revuoj Esperantalingvaj.

7) Oni sendu la tekstojn al s-ro J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malaga (Hispanujo).

8) La premio konsistas el 10.000 pesetoj.

9) "Gazeto Andaluzia" rezervas al si la rajton publikigi, en sia n^o 50 kaj en futura TTT-hejmpaĝo de AEU, la venkintan noveleton. Ankaŭ la plej bonajn ne venkintajn verkojn oni publikigos en la revuo, laŭ aparta konsento kun la aŭtor(in)oj. Ĉiun dubon pri ĉi tiu regularo solvos la juĝantaro laŭ sia kriterio.

En Malago, la 1-an de septembro de 1996.

J.F. Martín, Sekretario de A. E.V kaj de la konkurso.

=====

LINGVA LOGIKO ESTAS LA FUNDAMENTO DE LA FUNDAMENTO DE
ESPERANTO

Luiso Mimó Espinalt

REMEMORANTE LA 137-an DATREVENON DE LIA NASKIĜO

La 15-an de decembro 1996, diversarimede kunvokitaj de la organizacio "Kultura Asocio Esperantista" = KAE, inklude tra la loka Ĵurnalo, pli ol 70 geesperantistoj kaj simpatiantoj en - kaj eksterurbaj rendevuis, en la urbo Sabadell, antaŭ la tiea Monumento al D-ro Zamenhof, sur kies bazon oni deponis agrable impresan florbukedon, tiel solenante la 137-an datrevenon de la naskiĝo de la aŭtoro de Esperanto.

Tuj sekve, oni sin direktis, tra la tre proksima centro komerca de strato "Francesc Macià", al la strategie situanta "Pasejo Lluís Mimó Espinalt" bedaŭrata profesoro de Esperanto tiurba, sub kies nomtabulo oni pendigis milde belan florfaskon. Ambaŭ publikajn ceremoniojn ĉeestis, kiel dirite, ĉirkaŭ 70 gesamideanoj kun siaj familianoj, inter kiuj troviĝis s-anino Terezino Lladós, vidvino de la tutamonde konata esperantologo Luiso Mimó Espinalt, kaj ilia filo Roĝero, plurajare rezidanta en Maroko, kie li estras propran hotelon.

Post plezuriga vizito al tiu apuda "Parko Katalunujo", parto de la geĉeestantoj, nome ĝuste 41 personoj, amike kunmanĝis kaj vigle konversaciadis en restoracio de tiu moderna Parko.



Sur la tuj supra foto, reproduktita el loka Ĵurnalo "Diari de Sabadell", la geesperantistoj pozas antaŭ la Monumento al D-ro Zamenhof.

ILIAJ CIFEROJ JA NE KOINCIDIS KUN TIUJ FAVORITAJ DE LA SORTO

Efektive, la loterio-numeroj Kristnaskaj de la majorio de Esperanto-Klubo en Katalunujo, bedaŭrinde estis ignorataj de la fortuno, la pasintan jaron 1996.

Aparte de la kutima Esperanto propagando, enpresita sur ĉiuj tiaj biletoj, kaj de la konstatebla profito ricevita pro ilia disvendado, la Esperanto-Klubo atingis, el tiu tradicia lotado Kristnaska, nek gravan nek modestan premiojn, eĉ ne redonon de la investita mono.

Tamen estas konjekteble, ke en la nuna jaro 1997, ĉiuj Esperanto-Klubo refoje ofertas sian loterion, en la espero "peski" iun bonan premion. Do, optimisme antaŭen.

PRELEGO, EN ESPERANTO, FARE DE KAE-ANO

Ĝi havis lokon, la 26-an de novembro 1996, en la societo "Barcelona Esperanto-Centro". La preleganto, s-ano Martí Guerrero Cots, parolis proksimume unu horon pri ekonomiko. S-ano Martí, konata aktivulo en Georgismo, per sia milda vervo sukcesis altiri la atenton, de la esperantista publiko, al tiu ĉiam aktuala kaj interesa temo. Ĉeestis la prelegon, en reprezento de la KAE-estraro, s-anoj Josep M^a Galofré Domingo kaj Santiago Torné Grau.

OSIEK = ORGANIZA SOCIETO DE INTERNACIAJ ESPERANTO-KONFERENCIOJ

La pasintaj OSIEK-Premion oni atribuis al Paul Gubbins pro lia lernolibro internacia KUNVOJAĜU. La nunajara OSIEK-Premio estos aljuĝata en la urbo Rafina, Grekujo, kadre de Internacia Esperanto-Konferenco, kiu okazos de la 12 ĝis 18 de julio 1997. Pliajn detalojn petu al s-ro Eric Laubacher, kies adreso troviĝas en la fino.

Krom la koncernaj debatoj de tiu Esperanto-Konferenco, estas provizore planita tre interesa programo, nome : 1-a tago: kruizo al insuloj de la Saronika Golfo (Aegina, Poros, Hydra); 2-a tago: ekskurso al Epidauros-Mikeno -Nafplio; 3-a tago: ekskurso al insulo de Evolka golfo. Prezo 280 FF + 200 FF + 160 FF loĝado en hotelo en Rafina. Tagmanĝo estas inkluzivita en ĉiu aranĝo. Kompletajn informojn havigos al vi: s-ro Eric Laubacher, 1 rue des Vosges, FR-78180 MONTIGNYLE-BRELONNEUX, tel. + 33 (0) 1 30 96 67 91. Francujo)



KULTURA ASOCIO ESPERANTISTA = KAE
ASSOCIACIÓ CULTURAL ESPERANTISTA

Montseny, 5, 1^a

ES-08208 SABADELL (Katalunujo - Hispanujo)

LAŬSTATUTA KAE - ASEMBLEO, OKAZONTA EN 1997

La Ĝenerala Kunveno de la organizacio "Kultura Asocio Esperantista" = KAE, havos lokon dimanĉen mantene, la 26-an de januaro, en salono de la institucio "Centro Cívic de la Creu Alta" ĉe strato Major, 70, en la urbo Sabadell.

Tiu oficiala kunveno, komenciĝos matene je la 10.30-a horo, en unua kunvoko, kaj horduonon poste, t.e., je la 11-a horo, en la dua kunvoko, sub la jena tagordo

- 1) Legado kaj laŭokaza aprobo de la antaŭa protokolo.
- 2) Detala informo pri la Asocia aktivado dum 1996.
- 3) Aktuala kontostato de la Asocio kaj ties Delegacioj.
- 4) Parta anstataŭigo aŭ revalidigo de la ĝisnuna estraro.
- 5) Sugestoj kaj demandoj, kun iliaj oportunaj konkludoj.

Kiel kutime, la KAE-estraro restos duoble danka, se ĉiuj gemembroj klopodos akurate ĉeesti tiun Ĝeneralan Asembleon, kaj laŭeble alporti al ĝi sian pozitivan kunlaboradon, kio grandamezure faciligos kaj stimulos la Esperantisman taskon de nia Asocio.

Anticipan dankon al ĉiuj!



Jam preskaŭ 43 jarojn tiu tuj supra Esperanto-teksto ornamas, en la urbo Sabadell, tre frekventatan koridoron de la tiea institucio "Piaj Lernejoj", kiun memorigan tabulon oni inaŭguris okaze de omaĝo al la unua enkondukinto de Esperanto en tiu Kataluna urbo, la bedaŭrata s-ano P. Marco Lliró Riera.